# *Elstaraj kubaj muzikistoj en la listo de nomumitaj al Latin Grammy 2020*




**Tradicio, sono, ritmo  kaj gustumo  de la muziko kuba en  Latin Grammy 2020.**

La tradicio, sono, ritmo kaj gustumo dde la kuba muziko elstaras en la listo de aspirantoj al la premioj Grammy Latinaj 2020, per nomumo de kvin grupoj de la insulo.

La? informoj publikigitaj en la oficiala retejo de la evento, la orkrestro Failde ali?as al la kandidatoj de la nuna jaro per la muzikdisko Failde con Tumbao, produktita de la firmao Egrem, dum la orkestro Aragón prezenti?as kun la fonogramo Ícono, de la diskkompanio Puntilla Music.

Tiamaniere, la orkestro Aragón ree estas inter la aspirantoj al tiu premio, post esti nomumita pasintjare pro la partopreno en la disko Cuba linda, de la nederlanda trumpetistino Maite Hontelé kune kun William Borrego, Robertón, Alaín Pérez kaj Osaín del Monte.

Same elstaras en la kategorio de tropika albumo tradicia, la muzikensemblo Changüí de Guantánamo, kun la disko Tiu ?i estas nia Changüí, plus la albumo Mariposas (Papilioj) de Omara Portuondo, kiu en la anta?a evento estis distingita per la premio al Muzika Eminenteco, dua personeco kuba, kiui ricevis ?in (Juan Formell en 2013).

En la oficialaj retejoj de Failde, la membroj de tiu ?i ensemblo esprimis sian ?ojon pro tiu ?i agnosko al la laboro kaj sendis “brakumon el Matanzas al ?iuj nomumitoj, speciale al la kubaj reprezentantoj”.

En la kategorio de Pli bona urba kanzono elstaras la duopo Gente de Zona pro la kanzono Muchacha, farita kunlabore kun Becky G kaj Ángel Arce ´Pututi¨, sub la firmao Sony Music Entertainment US Latin LLC kaj Magnus Media LLC.

La latina akademio de sonregistaro, en la eldono 21-a de Latin Grammy, distingas la eminentecon de la hispana muziko, agnosko, kiu pasintjare havis inter la nomumitojn al la artistoj kubaj Chucho Valdés, Yelsy Heredia, Aymée Nuviola, César Orozco, Cuban Sax Quintet kaj la sinfonia orkestro Orquesta Sinfónica Nacional de Kubo.

Fonto : PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/235452-elstaraj-kubaj-muzikistoj-en-la-listo-de-nomumitaj-al-latin-grammy-2020

**Radio Habana Cuba**